




3^a trimestro 2012

LA TANDEMA TRAIRO EN KUBO

**En tiu numero
vi legos..**

J-J Moreau raportas pri la fino de sia tandema trairo en Kubo.	p.1 ĝis p.4
B. Ardon vojaĝis per loĝaŭto ĝis Norvegio. Jen la unua parto de la vojaĝo ĝis Ĉekio.	p.4 ĝis p.5
El la leteroj de Emile Bézier, J Gaumé eltiris frazojn, kiuj temas pri la klimato kaj pejzaĝoj de Turlando, kaj pri grava akcidento.	p.5 ĝis p.6
B. Turbillon instruis Esperanton dum multaj jaroj. Ŝi distingas tri ŝtupojn en la lernado.	p.6 ĝis p.7
La biblioteko de la grupo akiris novan libron : "Urboj por ŝanĝi la Mondon".	p.7
D. Baron daŭrigis sian laboron pri la vivo de la pastro Peltier, li proponas al vi broŝuron.	p. 8
B. Turbillon preparis krucvortojn.	p. 8
Por klarigi signifon de procesio okazinta en Sulmona la 17-an de Aŭgusto, P. Lalli verkis raporton pri Celesteno la 5-a.	p. 8

Ni eniras la urbon SANKTI-SPIRITUS. Bela kirko staras antaŭ ni. En la enirejo kuŝas ŝildo sur kiu estas skribita la nomo de la pastro, li havas bretonan nomon, ni sukcesas paroli kun li, la konversacio estas interesa, liaj diroj tro privataj, do, mi ne parolos pri ili, ni lernas multe de li pri la landa etoso.



La ponto Yayabo sur rivero Yayabo

Per la jarlibro, nia hotelestro telefonas al esperantistino kiu loĝas ĉi-urbe. Ŝi venas al nia rendevuo en la *casa-n particular-n*. Ŝi fruas, kun ŝi mi parolas flue, tio surprizas min, mi komprenas ŝin, ŝi komprenas min... aŭ ŝajnas fari tiel. Ni vespermanĝas kune, ŝi antaŭnomiĝas Isabela, havas 2 filojn denaske esperantistojn. Antaŭe, mi timegis kontakti eksterlandajn esperantistojn, ekde nun mi ne plu timos. Nun mi korespondas poŝte kun ŝi.

En Kubo por ke klubo estu agnoskata de registaro, ĝi devas havi minimume 30 anojn, maniero kiel alian sufoki la sindonemulojn.

Nun ni malkovras la urbon CIEGO DE AVILA-n. Mi sidas sur benko, 2 fipolicistinoj civile vestitaj ĉikanas min pri mia maniero starigi mian tandemon en la parkejo, mi respondas en la franca « Mi estas tie kaj restos tie, plaĉu al vi aŭ ne ! » Oldulo sidanta apud mi faras al mi signon per la lango, ke mi devus silenti... do mi silentas, pro tio ili foriras. Mi memoras pri alia urbo kie la etoso estis same, tial ni ne ĉeestos en la urbo tro longtempe. La nomo de la urbo originas el la nomo de farmisto de la 16^a jarcento, S-ro AVILA kiu kultivebligis vastegan kampojn post senarbigo de la ĉirkaŭa arbaro. (CIEGO).

Jen la urbo FLORIDA. Ni atingas ĝin per vojo flikita, la loko iom post iom mortas : la uzinoj malaperas unu post la alia. Malgraŭ la malriĉeco, la homoj aspektas feliĉaj. En la insulo, kio plej frapis min estas la malriĉeco, sed la kubanoj estas ĉiam purege vestitaj kaj zorgege tualetitaj. Estas granda faro kiam oni konas la staton de banĉambroj. La kubanoj estas ege in-

daj.

Serĉante « *Casa-n particular-n* » Kristoforo petas dormlokon de gapanto, kiu demandas al li « ĉu vi deziras ĉambron kun aŭ sen fraŭlino ? » Jen Kubo.

CAMAGUEY [Kamaguaĵ]. Urbo de potfabrikejo de praepoko. Ĉar la fontoj mankis, oni kolektis pluvakvon en grandegajn akvujojn, kiuj kuŝis sur la terastegmento. Hodiaŭ akvo fluas el la kranoj.



Papergvidilo por turistoj indikas, ke la bovinoj estas la « riĉeco » de la lando... sed neniam ni vidis bovaĵon en la magazenoj, nur ĉe vojkruciĝoj, porkaĵo estas vendota. La viando estas tranĉata sur ligna bloko per battranĉilo sub la suno. Por informo, la lakto ne venas de bovino sed de sojherbo. En la kamparo estas pli ofte senkulturejo ol kulturejo.

CAMAGUEY estas kreita en la jaro 1514 kaj nomiĝis Santa Maria del Puerto Principe. Ĝi estis du foje translokita. Henri Morgan kun liaj piratoj razis la urbon, ĝi estis rekonstruita. Tie kaj tie ĉi kuŝas diversaj ĵaroj el tero bakita, kelkaj el ili havas pli ol 2 cent jarojn, ili estis utilaj por stoki akvon.

En ĉiuj urboj la lernantoj ludas sur la stratoj dum la paŭzo ĉar la lernejoj estas eksdomoj de kolonianoj senposedigitaj tuj post la revolucio.

Kelkaj burĝaj domoj estas bone zorgitaj, sed la ĉefa problemo estas ke neniu posedas tiujn domojn, do, kial zorgi la domaron ?

La kirko Iglesia de la Merced, konsiderata kiel juvelo de la insulo ĵuse suferis kuracadon

de ĵuniĝo, ĉefe la ornamo de plafono estas miriga. En la koloniga epoko la insulo estis admirinda, malfeliĉe la sklavoj estis ekspluatataj, batataj, malestimataj... Hodiaŭ ĉio malsamas, la prezo pri libero estas supermezura por la kubanoj... eble iam, la prezo estos malpli kosta.

Post mallonga restado en GUAIMARO kaj LAS TUNAS, ni eniras BAYAMO-n [Bajamo], kie fluas la « Rojo Bayamo », tiu ŝipebla rivero sin ĵetas en la Rojo-n Caŭto, kiu estas la plej longa riverego en la insulo, ĉefa vojo por kunigi la urbojn antaŭ la veno de fervojaro en la jaro 1902.

Norde de urbo, marĉoj kaj lagoj provizis per fiŝoj kaj ĉasaĵoj la kolonianojn. Hodiaŭ, ĉasistoj povas pafi anasojn, ibisojn, koturnojn, kuniklojn, poste fiŝkapti perkojn per muŝo.

Ni tranoktas en « CONTRAMAESTRE », pro manko de preparo pri nia traŭro en Kubo, mi ne sciis ke junaj esperantistoj, kiuj estas kantistoj de AMINDAJ loĝas en tiu urbo. Tro malfrue mi sendis al ili retmesaĝon, ili respondis al mi tuj poste proponante renkonton, pro mia stulteco mi ne povis legi tiun mesaĝon ĉar ni jam estis en la aviadilo, mi ege bedaŭras.

Picfaristo gastigas nin. Li estas malriĉa, li dormos kun sia edzino en la kelo por ke ni dormu en ilia lito. Tutnokte, kokoj, hupadoj, bruegoj, trajnoj, laŭtega muziko akompanos nian nokton, mi kredas ke neniam ni fermis la okulojn ĉar la ĉambro estis sub la busatendejo. En la urbo estas malfacile trovi kafejon, kie oni povas trinki bonan kafon, kvankam la regiono antaŭ la revolucio estis fruktodona por la kafkulturo. Dum la revolucio oni detruis la kafkulturejojn. La patrino kaj la avino de la picfaristo posedis kafarbojn, nun ŝi havas nemon, nur senkulturejon.

Inter Contramaestre kaj Santiago de Kubo, survoje ni renkontas junan biciklanton, li iras al la merkato por vendi siajn varojn. Post donaco, Kristoforo babilas kun li ; ĉiutage li biciklas 50 kilometrojn por perlabori sian vivon. Ni plaĉas unu al la alia, li plilongigas sian

vojiron por ruliĝi kune kun ni, li gvidas nin al la adorejo d' « El Cobre » kie staras la statuo pri la « Virgulino de karitato de Kariboj », loko apud la minejo, kie oni eltiras la kupron subĉiele. En la jaroj 1600-a la minejo produktis la minaĵojn necesajn por la laborejoj pri artilerio de Havano. La adorejo estas fama, en ĝi kuŝas vestaĵoj de ĉampionoj olimpiaj. Nia nova amiko preĝas religie, ni demandas lin kial li preĝas, li respondas « por trovi afablan edzinon ». Dum la irado, li donacas fiere sian sombreron al mia edzino, kiu donacas al li sian kaskedon. Kristoforo, kiu rimarkis ke nia amiko ne havis akvujon, donacas sian plastbotelon kun la portilo, tiel nia amiko povos trinki pensante pri ni. Kiam ni devas forlasi lin, larmoj fluas sur lia vizaĝo, mi pensas ke li havis falsajn ideojn pri la eksterlandanoj, verŝajne pro turistoj, kiuj kondukas kiel riĉuloj. Hodiaŭ li vendis nenion ĉar li havis tro da plezuro ruliĝi kun ni.

Ni eniras SANTIAGO-n. La unua urbestro estis franca kaj nomiĝis kiel mi (Moreau) [moro]. En la urbo la franca influo estis ĉefa. Multe da kubanoj havas francan nomon kaj lernas la francan en la « Franca Interligo ».

Santiago estas urbo kiu spiras la arton, la muzikon, la kubanoj havas la arton en la animo.



La katedralo

La veturado okazas ĉu piede, ĉu bicikle, ĉu taksibicikle, ĉu taksimotorcikle, ĉu porbestkamione, ĉu aŭtobuse... sed ĉefe petveture. La polucio ĉie-estas, plie la urbo estas ĉirkaŭata de montaro. La « belaj usonaj aŭtoj » veturas ankoraŭ post 60 jaroj. Kiam la vojo

sobas, la stirantoj malstartas la motoron por ŝpari benzinon, kiu havas la saman prezon kiel en Francio. Retrorapidumo ne utilas, nur bremspedalpremo necesas.

Sudurbe, ni vizitas la fortreson « Castillo de Moro » (ne estas la mia !), detruita de piratoj kaj rekonstruita poste. Por iri tien la vojo ege soras, la militistoj estas tiom nombraj kiom la truoj. La maro multkoloras, ĝi estas kvietega, neni ŝipo ĉe la horizonto... vi divenas kial. Ni trempas niajn piedojn en la strandon de Siboney, la loko estus paradiza se ĝi estus zorgita...

La granda mistero en Kubo estas « kiel la kubanoj vivtenas sin ? » malmultaj perlaboras, la plejmulto vivas dank'al turistoj sed ĉefe dank'al la mono sendita de kubanoj ekzilitaj. Ĉiu familio havas karton por nutraĵo, ili rajtas porvivaĵojn malpli kaj malpli nombrajn. Magazinejoj kaj budoj aperas sed malaperas kiam la estroj devas pagi multe kostajn impostojn. En Santiago kiel en ĉiuj urboj oni trovas « placon pri libero », bustoj de Jose Marti kaj de la "Ĉe" staras. Grandaj frazoj sur la muroj pri revolucio sed neniam pri estonteco. Ĉio estas farata por lavi la cerbojn... kvankam, iom post iom tiaj frazoj ekmalaperas.



Kelkfoje staras sur placoj famaj rajdantoj sur ĉevalo. Kiam la ĉevalo levas la 2 antaŭajn piedojn, tio signifas ke la persono mortis dum batalo. Kiam la ĉevalo levas nur 1 piedon tio signifas ke la rajdanto estis vundita kaj kiam la ĉevalo staras sur 4 piedoj la rajdanto mortis en sia lito.

Trapasante la kamparon oni renkontas homojn kiuj ĉeestas de kiam iliaj prauloj alvenis por in-

vadi la insulon. Pro manko de transportrimoj, ili neniam translokiĝis, tiuj estas amerikanoj, afrikaj eksklavoj, ĉinoj, haitianoj, irlandanoj, neniam ili vojaĝis transinsule. Eĉ nun, pro monmanko. Tiu fakto frapis min.

Kiam ni diras al kubanoj ke ni trabiciklas Kubon bicikle neniu kredas nin ĉar ili neniam vojaĝis.

Alvenintaj en Santiago, post telefona voko ni renkontas junajn esperantistojn de la urba klubo, ili estas pli ol 25 membroj kaj zorgige lernas nian komunan lingvon. Ni transĉas la kukojn, kiujn ni kunportis. Ekde nun mi korespondas rete kun unu el la plej ĉefaj esperantistoj.

Johano-Jakobo

VOJAĜO EN NORDA EŬROPO

De la 18-a de Aprilo ĝis la 11-a de Julio, ni vojaĝis tra kelkaj eŭropaj landoj. Ni uzis nian loĝaŭton. Nia ĉelo estis Ĉeĥio, Pollando, Litovio, Latvio, Estonio, Finnlando, Svedio, Danio kaj Norvegio laŭ nia tempo.

Guy kaj mi ankaŭ estas tre sorbigataj de nia vojaĝo. Estis por ni kiel speciala aventuro. Neniam, ni pasis tiom da tempo kune. Neniam, ni pensis ke tiu vojaĝo okazos. Ni ne pensis, ke la kutimojn de la loĝantoj de niaj najbaraj landoj estas tiom malsamaj. Ni multe ŝatis ĉiujn landojn, kiujn ni vizitis, sed nia ĉefa vojaĝo estis Finnlando.

Ni instalas du grandajn gazbotelojn ĉar ni ne sciis ĉu ni bezonos hejti en la nordaj landoj. Fakte, la vetero estis tre agrabla, mal multe pluva.

Ni disponis tekokomputilon, ciferecan fotilon, mapon de Eŭropo kaj gvidlibrojn.

Por komuniki, mi iomete parolas esperanton kaj Guy parolas la anglan. Ni ne povis uzi telefonojn, nur inter-reton, kondiĉe ke ni trovis aliron : senpaga vifio (wifi). Do mi ne kontaktis esperantistojn ĉar mi ne sciis ĉu ni povus facile komuniki unu kun la alia. Ni sciis, ke ni povis aliri al Vifio ĉe Mc Donald, sed ni ne deziris tro uzi tion solvon. La gvidlibroj donis

kelkajn adresojn, ĉefe ties de turismaj oficejoj, kiuj proponas konekton.

Ni ne sciis, ĉu ni rajtos parki sur stratoj aŭ parkejoj de la urboj (ne devigitaj en kampadejo).

Por viziti Pragon, ni preferis iri en kampadejon. Poste, ni aliris al kampadejo cirkaŭ 1 fonoj semajne por plenigi kaj malplenigi la akvujojn kaj ankaŭ lavadi. Nur kelkfoje, ni ne trovis rapide lokon por parki. Plej ofte, ni haltis sur senpaga parkejo aŭ surstrate. Ni ne renkontis multe da loĝaŭtistojn, sed iomete pli ekde Svedio.

Ni decidis, ke ni precipe marŝos aŭ uzos niajn biciklojn.

Nia unua halto ekster Francio estis Nurenberg (Germanio), kiun ni vizitis.

Ĉeĥio, komence per Plzen estis tre agrabla, bona rimedo por kutimiĝi al la lando (mi neniam vojaĝis fore de Francio).

Plej ofte, ni aliris al la turisma oficejo por kolekti informojn, trovi mapojn. Prago kaj Ĉeĥio multe plaĉis al ni.

Plzen (1 tago) : promenado en la urbo.

Prago (3 tagoj) : vizito de la malnova urbo ; fama horloĝo ; kastelo ; katedralo St Guy ; Ponto Charles ; insulo Kampa ; muro « John Lennon » ; kvartalo Letna kaj ĝia grandega metro-nomo ; la « domo kiu dancas ».



Astronomia horloĝo de Prago

Ĉesky Krumlov (2 tagoj) : vizito de la urbo kaj de la kastelo.

Trebon (2 tagoj) : promenado en la urbo ; granda bicikla ekskurso tra marĉoj sur milit-ĉaraj vojoj.

Nedvenice (1 tago) : promenado en la urbo

kaj vizito de la kastelo « Pernstein ».

Olomouc (1 tago) : promenado en la urba centro.

Tio kio impresis nin : beleco de Prago (ne nur la centro) ; multaj biciklovojoj ; la disciplino de la piedirantoj kaj de la aŭtomobilistoj ; la bruo de la sirenoj (ambulanco, polico), kiu similas la usonajn ; tre bona akcepto de la loĝantoj (la Ĉeĥoj estas diskretaj sen esti malfamiliaraj) ; sekura etoso ; la tre malgrandaj parkejoj sur la aŭtovoj estas ĉefe aŭtoservejo (sen alia servo) ; la emo de la Ĉeĥoj por la kontrea muziko (country) ; la pano kun kumino ; la simplaj montraj fenestroj kaj malgrandaj magazenoj krom tiuj de la granda strato "de Parizo" (luksaj magazenoj) ; la trotuaroj konstruitaj per malgrandaj pavimero (nomitaj « kat-kapo » (kapo de kato).



Anekdotoj : En magazeno de Trebon, la vendistino multe zorgis pri ni ĉar ni ne komprenis la ĉeĥan lingvon. La ĉiĉeronoj ne akceptas trinkmonon.

Ni tiel ŝatis la landon, ke ni estis malgajaj forlasi ĝin. Eĉ poste la fino de nia vojaĝo, Ĉeĥio estas la lando, kien ni ŝatus ferii dum almenaŭ tri semajnoj, eble nur bicikle.

(La sekvo en la onta gazeto)

Brigitte Ardon por Guy kaj Brigitte

80-jaraj leteroj (sekvo)

Pri Francio kaj Turlando : klimato, pejzaĝoj, eventoj...

Momente en Francio la vetero estas malbona, pluvas ĉiutage, ĉiu nokte de post tri semajnoj.

La riveroj superakvas multe da urboj kaj vilaĝoj, kaŭzante multe da damaĝojn, trafinte precipe la laboristoj, kiu loĝas laŭlonge de la riveroj. (W, 28-11-30)

En nia provinco, preskaŭ neniam, neĝas, sed multe

pluvas, tio ne estas tre agrabla, ĉiam kaj ĉiam koton. Tamen dum la bela sezono la kampo estas tre belega, kaj flanko de la malgrandaj montetoj maturiĝas la vinberoj, per kiuj, oni faras bonegan vinon, bonreputacian en tuta Francio. (W, 8-1-31)

La rivero en kiu ni iris fiŝi fluas en tre belega loĝo, inter du montetoj. Por atingi la fiŝejon oni devas malsupreniri krutan deklivon kaj tie nur du homoj povas fiŝi ĉar la loĝo estas tre mallarĝa, sed en tia ejo oni kaptas multajn fiŝojn, ne dikaj fiŝoj sed : bretoj, tinkoj, plotoj, gobioj, k.t.p. (W, 20-4-31)

Jam de longe mi ricevis vian leteron, kiu plezurigis multe min. sed mi petas vin pardoni al mi, se mi, ne pli frue respondis al vi. Ĉar momente la vetero estas bela mi devas labori en mia ĝardeno kiu estas sufiĉe vasta. Tio donas kelkajn penojn al mi, sed mi estas bone rekompencata, ĉar la legomoj bone kreskas. Ĉiutage mi rikoltas fragojn kaj frambojn per kiuj mia edzino faras konfitaĵojn, kaj dum la vintro oni estas kontenta manĝi tiajn bonajn frandaĵojn. (L, 15-6-31)

Nun la vetero estas tre bela, la suno brilas ĉiutage kaj dum mia libertempo mi kaj mia familio promenas bicikle ĉar la ĉirkaŭaĵoj de Tours estas tre belegaj. En ĉi tiu provinco estas konstruitaj belegaj kasteloj historiaj, kiuj estas tre malnovaj. Do ĉiu dimanĉo ni forlasas la domon kunportante korbon plena per manĝaĵoj kaj ni pasigas la tutan tagon ekstere, ni manĝas sur la kampoj aŭ borde de rivero.

Venontan dimanĉon estos permesata fiŝkapti kaj tio estas granda plezuro por mi, ĉar mi ŝatas multe fiŝkapti. (L, 15-6-31)

Pro tio vi pravas, profitu la belan veteron por promeni, ĉar ĉiam oni laboras dum unu semajno, oni estas feliĉa libere vivi kaj puran aeron spiri. Sed bedaŭrinde, laŭ mia opinio, la liberaj tagoj pasas pli rapide ol la laboraj tagoj, ĉu ne ?

Mia familio kaj mi, ankaŭ eluzas la liberaj tagoj por promeni sur la kampo kaj en la arbaroj ĉirkaŭe de Tours. Venontan dimanĉon, la fiŝkaptado estos permesota, do mi frumatene forlasos la domon, por bicikle iri al la fiŝejo, kaj pli malfrue mia edzino kaj mia knabo venos retrovi min alportante la manĝaĵojn kaj ni restados la tutan tagon, borde de la rivero.

Sendube per la germana gazeto vi estis informata pri la terura katastrofo kiu okazis lastan dimanĉon. La ekŝkurso ŝipo San Filiber (Saint Philibert)